

Komuna poŝtadreso de LOS:

Abonkesto 2, Tiĥvin 6, Leningradskaja oblast, 187550 Rusio.

LOS: nomoj, respondecoj, rapidaj kontaktoj

Viktoro Kandalinskij, prezidanto, traktadoj kun oficialaj instancoj: tel. +7 81367 57 254;

Zoja Kaĉalova, mastrumaj aferoj: tel. +7 81367 71 167

Aleksandr Belov, kasisto: tel. +7 81367 79 638, rete: abelov@lens.spb.ru

Anton Kirjakov, retpaĝisto: poŝtel. +7 911 737 16 38,

Darja Vlasova, junularaj aferoj: poŝtel. +7 921 575 23 44

Mikaelo Bronŝtejn, ĝenerala kunordiganto: tel. h. +7 81367 76 093; tel. ofica/fakso +7 81367 60 738; poŝtel. +7 921 346 82 45; rete: mamuto@rambler.ru

BONVENON. KARAJ!



Al REK kaj Eo(A) 2007

Rusia Esperanto-Kongreso

2007

REK

kaj

Eo(A)

Esperanto-Lingvo Arta

Enspirindas aer' de l' muziko...

Karaj esperantemuloj - ŝatantoj de l' artoj kaj preferantoj de l' primovadaj kunsidoj, artistoj kaj aplaŭdontoj, ĵurianoj kaj talentuloj konkursemaj, dezirantoj iom riĉigi propran sperton aŭ doni ion el sia sperto al aliu, ardaĵ diskutantoj kaj atentaj aŭskultantoj, pliaĝaj kaj adoleskaj, aktivaj kaj ne tre - ĉiuj, ĉiuj, ĉiuj!

REU, REJM kaj Loka organiza skipo (LOS) invitas vin partopreni plian neforgeseblan aranĝon en Tihvin, eĉ du aranĝojn, okazantajn samtempe kaj samloke: la **25-an Rusian Esperanto-Kongreson (REK)** kaj la **19-an artan festivalon "Esperanto Lingvo Arta" (EoLA)**. Tihvin, en kies aero ĉiam ĉeestas refreŝigaj odoroj de altaj pinarboj, adstringaj juniperoj kaj admirinda muziko, vokas kaj atendas vin!

Tempo kaj loko

REK kaj EoLA okazos de la 6-a ĝis la 10-a de marto, sed LOS akceptos alvenantojn jam la 5-an. (Kaj eble estos senco veni eĉ pli frue, se realiĝos la planoj okazigi en Peterburgo Lingvan Festivalon, kiun momente oni deziras okazigi tuj antaŭ REK kaj EoLA. La gastoj estos tre bonvenaj partopreni kaj kontribui al tiu amasa porpublika aranĝo!) La kunsidoj, konkursoj, koncertoj kaj plejmulto el aliaj programeroj estas okazonta en sporta bazejo de vilaĝo Caricino Ozero, sep kilometrojn for de Tihvin aŭ cent naŭdek kilometrojn for de apuda Sankt-Peterburgo.

La urbo bone atingeblas per fervojo el Moskvo, Peterburgo, Uralo kaj Siberio. El Peterburgo eblas veturi ankaŭ per buse. Detalajn informojn pri la trafiko kaj mapon ĉiu aliĝinto ricevos en la dua informilo.

Programo

La programoj de REK kaj EoLA estos paŝantaj pli-malpli paralele. Nepre okazos: streĉprogramaj kunsidoj de REU-membroj, antaŭvidantaj reelekton de REU-Estraro; seminarieto pri la sperto de kontaktoj inter ĝemelurbaj esperantistoj; seminarioj, metiejoj kaj konkursoj pri diversaj artoj; koncertoj de konataj Esperartistoj kaj novicoj ekkonotaj; distraj vesperoj kun varma etoso kaj amika medio.

Laŭeble kaj laŭdezire okazos: koncerto por urbanoj, ekskursoj, rosmara naĝado, skiado ktp.

Kondiĉoj kaj prezoj

Partoprenantoj de REK-EOLA havas elekton inter kelkaj loĝeblecoj:

- en **kvarlitaj ĉambroj** de hejtata brika duetaĝa domo kun duŝo kaj necesejoj en ĉiu etaĝo - kontraŭ nur 200 rubloj por nokto;
- en **kvar-seslitaj ĉambroj** de hejtata ligna domo - kontraŭ 150 rubloj por nokto;
- en **oklitaj ĉambroj** (litoj kun matracoj sen littolaĵoj) de apuda nehejtata domo de infantendaro, kie oni instalos elektrovarmigilojn, kontraŭ 25 rubloj por nokto.

Bona **manĝo** trifoja kostos 200 rublojn por tago. Mendeblas aparte maten-tag-aŭ-vespermanĝoj. La mendo por manĝoj devas esti farita kaj antaŭpagita **ĉe aliĝo**.

Organizaj aliĝkotizoj:

- por REU-membroj - 150 rub.
- por junaj REU-membroj (REJM-anoj) - 100 rub.
- por ĉiuj ceteraj - 200 rub.

La aliĝilo, aliĝkotizo kaj la pago por manĝoj sendendas al adreso de kasisto: **Aleksandr Viktoroviĉ Belov, a/ja 2, Tihvin-6, Leningradskaja obl., 187550 Rusio.**

Informoj por inciteti

Tihvin estas antikva rusa urbeto (70 mil loĝantoj) kun eventoriĉa historio.

Almenaŭ du lokoj vizitindas en urbo - la sescentjaraĝa vira monaĥejo kun belegaj konstruaĵoj kaj kun unu el sep miraklofaraj ikonoj, plej adorataj de rusortodoksa eklezio, kaj la muzeo de Nikolaj Andrejeviĉ Rimskiĵ-Korsakov, fama komponisto, kiu naskiĝis kaj loĝis en la urbo.

Pro tiuj du vizitindaĵoj Tihvin ĉiutage akceptas ĉ. milon da pilgrimantoj kaj ekskursantoj.

Esperanto-klubo en Tihvin estas pli juna ol la urbo, ĝi estis fondita nur en 1975. Sekve la klubanoj dume ĥavas sanon, forton kaj impeton por altnivele aranĝi senenuan programon de via restado.

Pliajn informojn pri REK kaj EOLA vi trovos en la retpaĝo, baldaŭ ekfunkcionta. Dume bonvolu viziti la paĝaron de Tihvina E-klubo: www.tiek.narod.ru kaj la retejon de REU: www.reu.ru.



la monaĥejo

